hasta aquí totalmente identificado con usted, pero nuestro decanto viene a continuación: el esperanto creo que no es. Es demasiado difícil, y además no es lógico. Fíjese que, por ejemplo, la palabra escuela se llama *lernej*. Un vocablo estúpido para escuela, cuando en otros idiomas se dice *école*, *school*, etc. Es una bobada. Quién sabe. Quizá en el futuro..."

Perdone que una sencilla persona en las letras, pero un gran esperantista, le indique que *no tiene la menor idea sobre el esperanto*. Para empezar diré que, de no ser un error de imprenta, su desconocimiento es supino cuando dice que la escuela es *lernej*. Permítame que le diga que nuestra raíz *lern-* da origen al verbo *lerni*=estudiar, y el sufijo *ej-* 'lugar adecuado para' compone la palabra *lernejo* (léase *lerneyo*)—"escuela"—, mientras que nuestro vocablo *skolo*= "escuela" lo reservamos para indicar sistema o doctrina. Con esta lógica y sin excepciones se forma el esperanto, hablado por muchos cientos de miles de personas. Mi asistencia a los congresos de esperanto me ha hecho comprobar la eficacia de su uso tanto a nivel coloquial como científico y que han sido traducidas a él obras de Cervantes, Shakespeare, Tolstoi, la Biblia, el Corán y muchos más.

Ya bien quisiéramos que usted formara parte de los que hablamos, leemos y escribimos el esperanto, para que no se pierda y usted mismo pueda traducir sus obras a un idioma que tiene la mayor riqueza de flexibilidad de expresión y matización de ideas.

Un cursillo, aunque sea por correspondencia (le puedo dar direcciones) le dará a conocer en muy poco tiempo el dominio gramatical de esta lengua y no dar lugar a disparates como los expuestos y pasar después a la Academia Internacional de Esperanto, formada por preclaros lingüistas que le recibirán de muy buen grado. / Juan Antonio Giménez García. Valencia.

.- KONTAKTO № 84 (1984:2) "Esperanto en la kooperativoj"

.- Bulgara Esperantisto. Marto 84. "Esperanto. La lingva kreaĵo de Zamenhof" Estas Esperanto karakterizita de jenaj trajtoj: eblecon krei novajn vortojn, sintaksa diafaneco de la lingvi internacia (definita finaĵo por substantivo, adjektivo, verbo, adverbo), libera vortordo en propozicio (uzo de akuzativo) kaj fonetika ortografio.-- KonZice pri la historio de IFEF (tradukita kaj sendita al hispana fervoja revuo "Via Libre")

.- LA ESPERO EL KOREUJO. Marto-Aprilo 1984.- Tio revuo ĉiam prezentas tre interesajn artikolojn pri moroj kaj tradicia arto el Koreujo. Tiu ĉi numero temas pri la funebraj moroj.

.- MONATO № 3/4 1984. Post la numero 5, MONATO ĉesos aperi ĉar ne barbis sufiĉajn abonatojn

.- RESUMO DE LA RENKONTIGO PRI ESPERANTOLOGIO.-- Tri membroj de la Liceo: Pepe Arroyo, Gian Carlo Fighiera kaj Ana Montesinos, partoprenis, komence de junio, en la Unua Mediteranea Renkontiĝo pri Esperantologio, kiu okazis en Villafranca del Panadésa, apud Barcelono. Entute 45 geesperantistoj el 8 landoj, inkluzive de la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, André Albault, ĉeestis la renkontiĝon, dum kiu oni vizitis ankaŭ la Esperanta Muzeo en San Pau

.- VENONTAJ AKTIVAĴOJ POR ESPERANTISTOJ

.- Julio. SEVILLA. 44 Hispana Nacia Esperanta Kongreso

.- Julio. SANTIAGO DE COMPOSTELA. Internacia Renkontiĝo

.- Julio. VANKUVERO (Canada) 69<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Esperanto

.- Julio. BRITIO. TEJO Kongreso

.- Augusto. 2<sup>a</sup> Andaluza Kongreso de Esperanto. MALAGO

#### PROVERBO ARABO

Ne diru ĉion kion vi konas  
Ne faru ĉion kion vi povas  
Ne kredu ĉion kion vi aŭdas  
Ne elspezu ĉion kion vi havas.

ĉar :

Kiu diras ĉion kion scias  
Kiu faras ĉion kion povas  
Kiu kredas ĉion kion aŭdas  
Kiu elspezas ĉion kion havas.

multaj fojoj :

Li diras kion ne konvenas  
Li faras kion ne devas  
Li juĝas kion li ne vidas  
Li elspezas kion li ne povas.

#### La poetoj infanoj

Altaj estas la ĉielo  
kaj granda estas la tero  
kiel Dio sole  
ĉi tio li ne reparas,  
pro kio eliru el popolo  
la poetoj infanoj,  
kaj ili parolu je la mortaj  
kaj ili faru ke la vivaj  
foriras al iliaj pordoj :  
piedopremante la mensogecon  
kiu ili portas sur iliaj ŝultroj  
; kaj kiu amu la veron  
ke bruligu la vandoj !

- Manuel Gerena -  
( Tradukita Anna M. Durán )

- Aŭtoro : Salvador Vidal Abello  
Nomo : Cinc duros de ..... Poesía ?  
Temo : Hispana kaj 'Uso-Hispana Literaturo. Poezio.
- Aŭtoro : Salvador Vidal Abello  
Nomo : I .....  
Temo : Poezio
- Aŭtoro : Pierre Janton  
Nomo : El Esperanto  
Temo : Orientaj, Africaj, Usonaj kaj Oceaniaj Lingvoj.  
-- Tradukita kaj Adaktita : Damiá de Bas Macia
- Aŭtoro : Anónimas y Colectivas  
Nomo : Lexicón Sopena Esperanto Español y Español-Esperanto  
Temo : Lingvistiko kaj Filologio.
- Aŭtoro : Anónimas y Colectivas  
Nomo : Lexicón Sopena Esperanto-Español y Español-Esperanto.  
Temo : Orientaj, Africaj , k.t.p.
- Aŭtoro : Acosta Aleman, Sergio Emilio y Ulernum(ULECOSTA)  
Nomo : Esperanto Elemental  
Temo : Orientaj, Africaj , k.t.p.
- Aŭtoro : Fernando Soler Valls  
Nomo : Esperanto al alcance de todos  
Temo : Orientaj, k.t.p.
- Aŭtoro : Luis Mimo Espinalt  
Nomo : Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto  
Temo : Komparita Filologio kaj Lingvistiko. Historio Filologio.
- Aŭtoro : Carles Soldevila Zubiburu  
Nomo : Komedioj : Tamen, Civilizitaj kaj Negobulo  
Temo : Orientaj, k.t.p.  
-- Tradukita kaj Adaktita : Luis Mimo Espinalt
- Aŭtoro : Albert Lienhardt  
Nomo : Optimala Ortografio de la Internacia Lingvo Esperanto  
Temo : Lingvistiko. Esperanta Ortografio.

## Pri la taŭrofesto aŭ taŭroludo

Ludoviko Martínez

La kutimo diras kaj pensas ke ĉi tiu festo estas sendube arta festo, kaj logike oni povas ankaŭ pensi alimaniere.

La taŭro ĉiam riskas sian vivon kaj post longa suferado ĝi fine mortas, dum la toreisto ludas kun la besto kaj finfine ricevas monon kaj plaŭdojn.

Antaŭ la plimulto da personoj tio ne estas edifa spektaklo sed kontraŭe tio influas malbone en la moralo kaj alkiutimigas al mi sub estimi la beston kaj resti indiferenta antaŭ ĝia sufero kaj verŝita sango.

Se la homo certigas ke li estas la reĝo inter la bestoj, sendube li devas tion elmontri ne nur per siaj religiaj konvinkoj sed per siaj bonaj kaj progresigaj faroj.


Se la homaro bezonas sin amuzi per aliula sufero, neniam povas celi pacon por si, li ricevas tion kion li serĉas, kvankam ni ĉiuj volus nur ricevi la bonon.

=====

Benataj popolojn kiuj estas kruela en la festo kaj ne en la milito.

(Santiago Amón)


=====



da 5<sup>an</sup> septembro okazos la unuan Konversacian Rondon post la somero. Ni devas purigi la LICEON kaj plani la novajn kursojn. VENU!

Ni informos pri la Hispana, Universala kaj TEJO Kongreso en la venonta numero de Nia Vojo je la fino de septembro





LA LICEO NE FUNKCIAS BONE, EKONOMIE, ni havas monon por pagi luado, lumo kaj telefono dum 3/4 monatoj= Poste ni devas vendi loterion.  
BONVOLU: Pagu viajn kotizojn



# nia voĉo

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO

DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:

c/ Atocha 98- 4º

MADRID - 28015

SEPTIEMBRE - OCTUBRO

1984



Revista Viajar. Junio 1984

**Turismo esperantista**

Para quienes conocen o están interesados en el esperanto, lengua artificial de vocación internacional, existe la posibilidad de realizar viajes organizados con participación de gentes de diversos países. Además de los folletos turísticos editados en esta lengua por algunos organismos oficiales de nuestro país, la Organización Internacional de Esperanto publica anualmente un directorio con la relación de todos aquellos esperantistas que están dispuestos a recibir huéspedes en sus casas, en el que figuran ofertas procedentes de casi todas las más importantes ciudades del mundo. También existe un servicio de viajes internacionales, «Esperanto-tour», con delegaciones en Bélgica, Gran Bretaña,

Polonia y Turquía. Finalmente, señalaremos que hay numerosos albergues, campamentos y hoteles para esperantistas repartidos por la geografía del mundo; en España cuentan con un camping de este tipo, el «Esperanto Oazo», en las proximidades de Gandía.

VIAJAR Junio 1984 publikigis noton pri la esperanta turismo: Pasporta servo, Esperanto-tour, Esperanto Oazo, ktp.

ESPERANTO Majo 1984. Ekde oktobro la Universitato de Londono enkondukos kurson de Esperanto en el Departamento de Fonetiko kaj Lingvistiko. (En Madrido lernigas Esperanton en la Fakultato de Filologio). Raporto pri la agado de UEA dum 1983: Membroj- 37.508. UEA havis rilatojn kun: Unuigintaj Nacioj, Unesko, Internacia Telekomunika Unio, Araba Organizo pri Edukado, Monda Turismo Organizaĵo de Amerika ŝtatoj kaj Europa Ekonomia Komunumo

ESPERANTO junio 1984. Informado pri Esperanto al eŭropaj parlamentanoj en Belgio.

LA CENACERO nº 2. Estas devo de ĉiu esperantisto aĉeti librojn en Esperanto. Unu ĉar ni efike kunlaboras por la disvastiĝo de nia kara lingvo kaj due ĉar ni devas subteni ŝanĝon kondiĉe niajn verkistojn. Ni kalkulas hipoteze ke en Hispanio estas 3000 esperantistoj; nu, ĉu vi opinias ke en la tuta jaro oni disvendus 3000 librojn?. Certe ne.

ESPERANTO SLOVAKA nº 2. Legu artikolon "Kio estas Akademio de Esperanto?" por koni la historion de tiu institucio.

BULGARINO 1983. Virina revuo kie ĉiuj fotografioj estas de virinoj. Eĉ la artaj fotografioj estas de "kariatidoj" (virina skulptaĵo) !!!

HORIZONTO DE SOVĜETA LITOVIO. Sepa kajero. Ortografio de propaj nomoj en Esperanto

OOMOTO jan-junio 1984. Ĥ-ĉu tro malofta?

EL BUTLLETI DE CASTELLDEFELS. Nº 58. Nekrologo pri morto de esperantisto Ramon Fernandez Jurado kreinto de la Kasteldefels Esperanto Grupo kiu havas paĝon en la urbestra revuo.

. o o o o o o o o .





# Maŝinoj, ba!

Francisko Ksavero

Moleono, Hispanio

Post la taga laboro, sinjoro Proto revenas el sia hejmo. Bombo-brue li fermas la pordon.

- Saluton, karulino! Jen mi estas.
- Saluton, karulo. Ĉu ĉio bone hodiaŭ?
- Jes, ĉio. Escepte de tio, ke en la oficejo la kafeŝino rompiĝis kaj ni ne povis trinki kafon. Ha, kiajn dezirojn mi havis, reveni hejmen por televidi la matĉon!
- Por televidi? Bone, Kinĉjo, mi devas diri, ke, kiam mi antaŭe televidis, la televidilo ekfumis kaj... nu, difektiĝis.
- Difektiĝis? Mi! diabloj! Ĉu mi ne povos spekti la matĉon?
- Ŝajnas ke ne, karulo.

- Ha, maŝinoj, maŝinoj! Ba! Ne gravas Ĉu vi povas doni al mi oranĝosukon?  
 - Oranĝosukon? Hm... la problemo estas, ke, kiam mi antaŭe elprenis oranĝojn, la oranĝopremilo ĉesis funkcii. Kvankam mi provis ĉiel ajn sciigi, kiel ĝi haltis, tion mi ne atingis.  
 - Sed kio do okazas hodiaŭ? La maŝinoj difektiĝas! Ili taŭgas por nenio, nur por malfaciligi la vivon.  
 - Ne diru tion, karulo. Ili helpas nin.  
 - Ili helpas, ili helpas... ba! Ili difektiĝas, kiam ni pieje bezonas ilin. Mi legos la ĵurnalon.

S-ro Proto sidiĝis por legi.

- Ĉu vi vidas? Ĉu vi vidas? Vidu ĉi tiom: en nurunu tago aŭtomobil-, trajn- kaj aviadil-akcidentoj. La maŝinoj estas sentaŭgaj pecaroj, sentaŭgaj eraroj. Ili iam malaperigos nin. Kaj ĉi tio: "Granda firmao aĉetas komputilon por sia planado". Ĉu vi rimarkas? Kiam ili ne rompiĝas, ili provas superi nin. Ha, ili fariĝas eĉ danĝeraj. Kia terura penso, ke ili povus anstataŭi nin.  
 Brr... ĉar mi nenion povas fari, prefere mi enlitiĝu por ne pensi pri ili.  
 - Do bone, karulo. Ne zorgu pri tio - ŝi trankvilige diris. La maŝinoj neniam anstataŭos nin.  
 - Espereble. Bonan nokton.  
 - Bonan nokton. Kaj ne forgesu obei viajn ŝraŭbojn antaŭ ol enlitiĝi. ▲

Sraŭbo: Metala aŭ ligna turnpeco, kiu oni uzas por kunfiksi objektojn; ĝi estas necesa en la farado de maŝinoj kaj lignaĵoj.

KONTAKTO N° 85. Artikolo de Javi /Maŝinoj, ba!/. La tuta numero estas titolita "Homo kaj maŝino" kaj havas diversnivelaĵajn artikolojn por faciligi la legaĵon al novaj geesperantistoj.

MONATO 5-6/84. La revuo ne mortos sed bezonas la subtenon de la esperantistoj. Vi povas legi ĝin en la Liceo. - Raporto pri hispana konkurso de gvidaj hundoj de pastisto


La ESPERO el Koreujo. V 9 N° 3. El la revuoj ricevitaĵoj en ĝia redakcejo aperas "Nia Voĉo", sed ne estas el Madrido, ĝi estas la samtitola revuo de la Dana Laborista Esperanto Asocio. Kuriozaĵo. Ĉu ne? Kiel kune aperas rubrikon pri Koreaj tradiciaj festotagoj

HEROLDO N° 9(1732). Foto pri la donaco al muzeo de Don Kiĉoto en Toboso de la Esperanto tradukon de tiu hispana ĉefverko.

17-9-84 programo "La tarde" TVE parolis pri Esperanto.

Libro "Un caracol en la cocina" A.F. Molina. Ediciones Picazo. 1970. Premio Ciudad de Palma 1970. Paĝo 138 "ellas hablan entre si y aunque cada una utiliza su idioma, se entienden tan perfectamente como si todas hablases el esperanto" paĝo 174 "sabia pronunciar algunas palabras en esperanto"

EL ORDENADOR PERSONAL N° 26. Publikigis leteron sendita el Lupe pri projekto "Esperanto Komputilo" por programi komputilojn en Esperanto. Ankaŭ aperis adreso de la grupo, kiu akceptas komentariojn.



- En augusto ni organizis someran kurson. Instruisto: Augusto I. Ni anoncis ĝin en komunikaj medioj kaj per afiŝoj (100) en la kvartalo de la Liceo. Bedaurinde ne venis gelernantoj (nur 2)
- Ni skribis al organizantoj de JUVENALIA petante budon por la Liceo. Ni kalkulas kun via helpo se nia propono estus akceptota.

- Membroj de la Liceo kiuj pagis ĝis junio 1984: 106

**BONVOLU PAGU VIAN KOTIZON PER BANKO**

- Augusto elsendis programeton en Radio Cadena en la somero
- Semajfino 20/21 aŭ 27/28 oktobro ni ekskursos al Albarracin (Teruel). Renkontiĝo kun samideanoj el Aragono, Valencio, Katalunio ktp. Tre mal-multekosta restadejo, ankaŭ vi povas tendumi

- Ana Montesinos kaj Belen partoprenis en la Jun<sup>ulara</sup> Internacia Kongreso en Britio.

- Emi, Klara, Mary Luz kaj Jose Luis restis unu semajno en esperanta kampingo en Hungario.

- Ada kaj Ana M. vojaĝis al Vankuvero por la Internacia Kongreso.

- Japana esperantisto petis helpon al madrida samideanoj por solvi gravan problemon: lia pasporto estis ŝtelita kaj la policanoj ne komprenas iajn

lingvojn: angla, germana, franca kaj japana kiuj estis parolata, la japana esperantisto. Jorge Camacho kaj Esperantisto solvis la lingvan problemon.



- Pola esperantistino Marta Podgorska vizitis Madrido

- 26-9-84 Ada prelegis pri la Internacia Kongreso en Vankuvero

- 3-10-84 Miguel Angel Sancho prelegos pri "Mikrokomputiloj kaj Esperanto"

- 17-10-84. KOMUNAN BANKEDON. Alportu trinkaĵojn aŭ manĝaĵojn.

El ordenador personal N° 26

Les envío esta pequeña nota por si consideran oportuno su publicación:

Desde hace varios años una firma comercial holandesa estudia un proyecto para fabricar ordenadores programables en la lengua internacional Esperanto (teclado, sistema operativo, programación, etc.). Los integrantes del proyecto «Esperanto-Komputilo» esperan comentarios de los especialistas en la siguiente dirección.

Mondkomerca Eldonejo Esperantista. P.O. Kesto 25041. NL-3001 HA Rotterdam (Holanda) Traducido de HEROLDO DE ESPERANTO

30 de marzo de 1984

G. Sanz Bueno (Madrid)

o o o o o o o o o o

K I E L K U T I M E

N I K U N V E N A S

venu venu venu venu venu

M E R K R E D E

Kiel oni anoncis, la 40 IJK okazis de 12a ĝis la 20a de julio en Swanwick (Britio). La temo de la kongreso estis "Homo kaj maŝino", temo sufiĉe interesa kaj kun diversaj aspektoj por pripensi.

La programo estis tre varita: okazis (kaj prelegoj (Muziko kaj maŝino; Sklavo aŭ minaco?; Maŝino kaj maŝino; Ĉu senluma, satana maŝino?; Humoro kaj Humoro.) kiujn ĉeestis granda parto de la kongresanoj.

Oni povis ankaŭ diskuti, en diversaj temoj, pri armilo kurado kaj la verdaj parioj. Aliaj temoj, malpli seriozaj, estis la laborgrupoj en kiuj oni povis lerni BASIC-n kaj kiel programi komputiloj, sportoj kaj mediteraneaj popoldancoj, ludi kroketon aŭ ŝakpilkon, k=t=p.

Partoprenis ĉi tiun kongreson homoj de 24 landoj: el tuta Europo (Orienta kaj okcidenta), Hispanio, Israelo, Soveta Unio kaj Koreujo. El Hispanio partoprenis SEP personoj.

Oni ekskursis duontage al proksima historia Muzeo pri Tramoj, la trinkejo Verda Stelo, la ŝtormuzeo, la bierfarejo kaj, tuttage, al la kastelo de la kaverno de Castleton kaj poste la besto ĝardeno en Metlock kiu entenas multajn rarajn speciojn de bestoj. Vespere ĉiuj partoprenis en la vestobalo vestoj kaj maskoj, kaj ni amiziĝis multege.

Ni povis ankaŭ vidi la filmon "Angoroj", pleme produktita en Esperanto, kaj teatraĵon prezentita de la francaj kaj la jugoslavo.

En la adiaŭa horo ĉiuj kantis kaj anoncis (kaj ploris) esperantaj revidi nin reciproke la venontan IJK en Germanio.

Belén



En la Liceo ni  
 havas novajn insignojn  
 po 100 ptjn

Pli ol 200 esperantistoj venintaj el ĉiuj flankoj la hispana geografia partopreneis en la 44-a nacia Esperanto-kongreso de HEF, kiu okazis en Seviljo de la 6-a la 11-a de julio.

La kongresa ĉeftemo "Turismo, ĉu socia fenomeno?" estis enkondukita de du madridanoj: Miguel Figuerola kaj Gian Karlo Fighiera, kiuj respektive eldiris la festparoladon kaj gvidis la proturisman seminarion.

Dum la kongreso estis pritraktita la organizado de la Jubilea Esperanto-jaro 1987 temo pri kiu parte okupiĝas Miguel Angel Sancho prezidanto de HEJS.

Sufiĉe multaj madridanoj aktivis la manifestacio, inter kiuj August Casquero (laŭ kies propono la emertuloj estonte pagos nur duonan kongres-kotizon), Georgo Camacho (Esperantaj ekzamenoj) kaj Angel Gansó (emeritula grupo). La kongreso oficiale dankis s-anon Flores, dankal kiu iniciato HEF ricevis donaco la sudejon en Rodriguez San Pedro 13 (Madrido)

Fine, la Sevilja kongreso akceptis rezolucion pri la rolo de Esperanto je la servo de la turismo: la rezolucio estis poste formale tradonita al hispanaj aŭtoritatoj kaj al la Monda Turisma Organizaĵo. Detala raporto pri la aranĝo aperos en "Boletín" de HEF.

ĈIU TEATROAMANTO, KIU DEZIRAS PARTOPRENI  
EN LA KREADO DE TEATROGRUPO, BONVOLU VENI  
EN LA LICEON MERKREDE AŬ KONTAKTI MIGUEL

Telf. 7-59-46-40



## KUN NOVAJ FORTOJ

Ek de septembro, la Madrida Esperanto-Liceo rekomencis sian plurflankan agadon, kiu konsistas el organizado do: kursoj, komunaj programoj kaj distraj aranĝoj.

Por la sukceso de nia laboro favore al Esperanto kaj survoje al la Centjara Jubileo de 1987, nepre necesas la kunhelpo de ĉiu, kiu en Madrido nomas sin esperantisto. Tial, ĉiu el ni, libervole kaj kun la entuziasmo veninta el la sento labori por justa ideo, sentu sin alvokita transpreni parton de la ĝenerala taskaro plenumenda por ke la Liceo pluvivu kaj la Internacia Lingvo progresu.

Kursoj: Estas memorigite, ke ili komenciĝos en la sidejo de la Liceo (Atocha 98) la 10-an de oktobro 1984

Distraj aranĝoj. Kelkaj renkontiĝoj kaj ekskursoj estas en preparo. La unua okazos la 27-an kaj 28-an de oktobro kun celo al *Albanujo*, kie oni renkontiĝos kun la Valenciaj esperantistoj.

Komunaj programoj. Ili plue okazos ĉiumerkrede laŭ la suba skemo:

- unua merkredo de la monato: publika Estrara kunsido
- dua merkredo " " " : parolado
- tria merkredo " " " : bufedo (manĝoj alportitaj de la partoprenantoj)
- kvara merkredo " " " : konversacia rondo.

Sekvas ĉi-sube la programo de la venontaj monatoj. Prelegontoj por posta periodo bonvolu anonci sin.

### Oktobro

- Merkredo, 3 oktobro: publika kunveno de la Estraro
- " 10 " : parolado pri "Televida komputado" de Miguel Angel Sancho
- " 17 " : komuna festeto: ĉiuj liceanoj estas petataj kunporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon
- " 24 " : konversacia rondo
- " 31 " : konversacia rondo

### Novembro

- Merkredo, 7 novembro: publika kunveno de la Estraro
- " 14 " : parolado pri "1987 -Jubilea Kongreso en Madrido" de Augusto Casquero
- " 21 " : komuna festeto: ĉiuj liceanoj estas petataj kunporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon
- " 28 " : konversacia rondo

### Decembro

- Merkredo, 4 decembro: publika kunveno de la Estraro
- " 12 " : parolado pri "Ruĝa tapiŝo aŭ sekretoj de la



Post amasa Kongreso en Budapeŝto pasintjare, la 69-a en Vankuvero (21-28. VII. 84) estis relative malgranda (802 partoprenantoj el 45 landoj), do vere intima. Kontribuis al tio ankaŭ la loko, ĉar ĉio okazis en la bela Universitata urbeto. Ankaŭ la vetero ne estis kutima en tiu parto de la amerika kontinento: daŭre brilis la suno kaj estis agrable varme.

La programo estis riĉa: diskutoj pri la ĉeftemo "Lingvaj minoritatoj — ĉu nur nacia fenomeno?", Tago de la Lernejo, prelegoj de d-ro J. Wells "Lingve tra la mondo", ses interesaj prelegoj en la Internacia Kongresa Universitato, Agado ĉe UN kaj Unesko, Parlamenta Agado, Aŭkcio, Fakaj kunsidoj — jen nur supraĵa priskribo de tiu riĉa semajno.

Teatrajn Vesperojn okupis unu persono: la pola aktorino Jadwiga Gibczynska, kiu lerte kaj arte prezentis la dramojn pri Zamenhof kaj Maria Skłodowska-Curie. Krome okazis ankaŭ Nacia kaj Internacia Vesperoj.

Tuttagaj ekskursoj kondukis la kongresanojn al Viktorio, Kanjono "Fraser", Vilaĝo "Squamish" kaj la valo "Fraser".


Kvankam oni estis ĉirkaŭita de la angla lingvo, la intereso por Esperanto estis granda. Ne nur multaj ĵurnalistoj antaŭ kaj dum la Kongreso (artikoloj kaj intervjuoj gazetaj, radiaj kaj televidaj), sed eĉ en ĉiu vendejo, en la universitata restoracio, dum veturado en taksio — ĉiuj, vidinte niajn insignojn kaj aŭdinte niajn interparolojn, demandis informojn pri Esperanto.

Sabaton, la lastan tagon, la prezidanta martelo per frapo fermis la 69-an Universalan Kongreson. Sed antaŭ tio Elisabeth Bormann, en la nomo de la LKK-Aŭgsburgo, invitis ĉiujn al tiu bela, mezepoka bavara urbo, kie de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1985 okazos la 70-a U.K.

(Ada)

Pli detalajn raportojn vi povos legi en "Heroldo de Esperanto" kaj "Esperanto" de UEA.

aĉetis  
a dike  
remion !!



Kristnaska  
Loterio  
de la Liceo

LA VALORO DE LA PANO

tiu jetas panon en la rubujon devus tuj brui. Jen proverbo, kiu as unu el la plej malnovaj kaj efikaj nutraĵoj, la panon.

Ĝia ni vivas en mondo, en kiu konstante oni parolas pri la fia-homo, tio estas, la milito, subpremado, analfabetismo, venenigo osfero, kaj kial ne, la malsato. Jen terura vorto: malsato, vorto la praepoko malkvietigis kaj malfeliĉigis la homon. La malsato patrino de multaj aliaj malsanoj. Pro tio, kiam oni jetas panon, malprofitas tiun juvelon de la nutrado, oni devus multe pripensi aĝecon.

u vi serioze pensis, kio estas la pano?. La pano ne nur estas la ia manĝaĵoj; ĝi estas la simbolo de multaj el niaj agoj. Ofte la s fundamenta ŝtono sur kiu baziĝas parto de nia filozofio.

Ĉu vi neniam pensis, kiom oni devas labori por ke la pano ornamu igitan manĝotablon?. La vojo estas longa kaj peniga. Multaj hom-kunlabori por ke la pano alvenu al vi, tiel kiel vi ĝin konas.

fariĝu tio, en opinio de multaj personoj - ordinara manĝaĵo-omoj antaŭe devis ŝvitadi; ne sufiĉe dormi; sperti, ĉe siaj viza-joj, brulon kaj forvelkon pro la ardaĵ sun-radioj; daŭri suferi ma-lum la vintro; kaj krome streĉe atenti kun maltrankvilo la kontro-ri ĉielo petante pluvon aŭ halton de la pluvado. Cetero, aliaj ho-

necesan manĝaĵon, kies fundamentan valoron por la homa nutrado oni ofte forgesas.

Jam la antaŭan jaron, la terkulturisto devis selekti la plej taŭ-gan tritikon por ĝia semado. La bona elekto de la semoj estas unu el la plej grandaj garantioj de sukceso, en kiu ajn aspekto de la agrokulturo. Do, la terkulturisto konscianta de tiu valoro zorge elektas la semon. Pri-zorgi, prepari, pretigi la grundon estas alia el la plej elementaj kaj fu-ndamentaj taskoj de ĉiu kamlaboristo. Estus longa analizi la proceson kaj detale priskribi ĉiun laboraĵon por ke la grundo, en favoraj kondiĉoj akcep-tu la semon de tio, kio estos unu el la plej bonaj manĝaĵoj: la pano. Se-mita la tritiko, la kamlaboristo pacience atendadas la forpason de la vin-tro, sezono dum kiu la semitaĵo enradikiĝas en la tero. La printempo estas la - ŝlosilo de la rikolto - kiel ofte oni diras en la parolmaniero de la kamlaboristoj. Kiom da fojoj la terkulturisto devas, vole-ne-vole rigardi la ĉielon!. En la agrokulturo ne ekzistas programita laboro, kiel ĉe iu ajn industrio. La nura programo radikas je tio, ke la vetero estu favora por la kreskigado de la tritiko. Malgraŭ ĉiuj inventoj kaj antaŭdiroj de mod-ernaj maŝinoj pri la vetero, nenion oni scias pri tio, ĉu la rikolto estos abunda kaj ĝia kvalito kontentiga; ĝi restos enigmo, kiu nur estos konata, kiam la tritiko troviĝos en la magazenoj. Somero, la esperiga kaj atendata epoko de la jaro, estas la sezono en kiu okazas la plej penigaj laboroj. En tiu periodo ne estas ripozo, senerare oni povas aserti ke dum la dudek kvar horoj de la tago oni laboras. Vero estas, ke lastatempe la modernaj

... - somerlaboristoj - ne enlitigis eĉ dum du monatoj. Ilia malmulta do-  
mado ĉiam okazis en la draŝejo. Dum la nokto oni alportis la grenon de la  
kamparo al la draŝejo, kie dumtage oni draŝis ĝin. Poste oni devis aparti la  
grajnojn el la pajlo por finfine ĝin enmagazenigi.

Tamen, por ke tiu reĝo de la manĝaĵoj, kiu estas la pano, troviĝos  
viadispone ankoraŭ mankas multaj aliaj laboraĵoj, ekzemple la mueligo de la  
tritiko en la farunfabrikoj kaj la ne ĉiam plaĉa ellaborado de la pano en la  
panfarejoj, kie, apud la fornoj, la bakistoj ege ŝvitas. Jen valoro kaj labo-  
ro por havigi al ni la plej bongustan kaj nutran el ĉiuj la manĝaĵoj: la panon.

Kiam vi metas pecon da pano en vian buŝon, ĉu vi pensas, kiom da ho-  
moj laboris por ke vi povu gustumi ĝin?, kaj kiam vi forĵetas en la rubujon  
la tiel nomata - hieraŭan panon - ĉu vi pensas kiom devis peni aliaj homoj  
por ĝin pretigi al vi?. Ni, kiuj tre ofte kaj senpripense subestimas la gr-  
andan valoron de la pano, certe neĝuste taksis ĝian efektivan, neanstataŭblan  
rolon en nia ĉiutaga vivo.

Seĉ ni, ne taksu tiun pan-valoron nur laŭ nura vidpunkto, ĉar la  
proceso ĝis ĝia elfariĝo estas ankaŭ grava kaj influa en la labora kaj socia  
kunvivado. Ĉu vi neniam pensis, ke motive de tiuj agrokulturaj laboroj multaj  
homoj restis analfabetaj? Kiu ne scias, ke en la terkulturaj regionoj la pro-  
cento de analfabetoj estas pli granda ol en tiuj industriaj?. Estas evidente,  
ke en la subevoluiĝintaj landoj, en kiuj la agrikulturo estas la bazo de la  
nacia rento, la analfabetismo atingas pli altajn ciferojn ol en tiuj industr-  
igitaj. Jen alia ĉapitro en ĉi tiu libro de la pano, kiun neniu konscia ho-  
mo devas forgesi.

... kaj ne nur plenkreskuloj, sed eĉ infanoj, laboris por vi. Multaj el  
preskaŭ neniam vizitis lernejon, pro tio ke de sunleviĝo ĝis sunsubi-  
vis labori en la kampo. Nu, malgraŭ tiuj penigaj laboroj, probable v-  
viaj plej senripensaj misfaroj, forĵetas la karan nanon, tiel senho-  
laboron de multaj aliaj homoj, kiuj abenaŭ kapablas skribi sian nomon  
ke ili konstante laboru por ke vi povu ĉi tiu reĝo per la plej bona  
pano. Felice, nuntempe, tiu malagraba situacio pliboniĝas kaj ĉi tiu  
novas viziti lernejon.

La panfarado ĉiam estas grava arto. Ne ĉiu panfaristo kapabl-  
ti la nanon sangustan. En ĉiu urbo aŭ vilaĝo ekzistas iu panbakisto, ĉi  
pli fama ol la aliaj. La forno de la pano preskaŭ ĉiam prezentigas la  
tradicia kutimo de la regionoj aŭ landoj. Ekde tiuj rondformaj, kies  
kvar aŭ kvin kilojn, ĝis tiuj aliaj plilonigitaj kaj mallarĝaj nomataj  
"gaj de Parizo", la pano ĉiam estas prezentata diversmaniere.

Nuntempe la industrio de la panfarado ankaŭ evoluis kaj la r-  
estas disvundata sub aliaj nomoj kaj stiloj, inkluzive ĝia elfarado ne  
el antaŭe. Oni inventis nomojn kaj novajn sistemojn de bakado sub la p-  
ke tiamaniere la nano ne dikigas la panmanĝemulojn, kio laŭdire evitas  
doloron, kiu estas la grasigo, recepto laŭ virina vidpunkto. Tamen, mal-  
novaj aspektoj, kiujn laŭtatempe oni havigas al la nano, ĉi tiu manĝaĵo  
tos samloke; ĉi ĉiam estos la privilegia manĝaĵo super ĉiuj la aliaj. Ĉi  
neniam oni novos ŝanĝi la grandan rolon de la pano en la ĉiutaga vivo.  
Oni povas inventi formojn, nomojn, gustojn kaj elfaradon de la pano, s-  
novas okazi; la pano ĉiam estos la baza nutraĵo de la homo.

La funkcio de la pano en la historio ankau estis transcenda. Estas okazinta-  
soj en kiuj la pano rolis la ĉefan taskon. La influo de tiu nutraĵo en la popoloj  
estis kaj estas granda. Ni alportu komentariojn kaj ekzemplojn; tiun travivaĵon de  
la franca popolo, ĝis konata. La pariza popolo manifestaciigis, kriadis kaj pro-  
testadis pro la malsato. kiu regis tiutempe en la urbo. Okaze de tiuj eventoj la  
ĉefa ministro informis altrangulinon kiu estis kunrespondeca de la tiama situacio,  
Sia Ekscelenco, la popolo iras en la stratojn kaj konstante plendas pro malsato,  
ili petas, rostulas panon.

Ĉu ili ne havas panon?, demandis la eminenta sinjorino.

Ne, respondis la sinjoro ministro.

Nu, ĉi respondis, se ili ne havas panon, ke ili aĉetu kukulojn.

Sed, la respondo de la popolo ankau ne mankis, kaj post kelkaj tagoj la fran-  
ca aristokratulino restis dekapigita.

Se ni eltiras konkludon de ĉi tiu historia raporto, tuj evidentiĝas, ke se  
la franca popolo estus havinta panon, tiu terura okazintaĵo neniam estus okazinta.  
Ĝon, kio pruvas la valoron de la pano. Tiu malsatanta popolo ne petis luksaĵojn, ne  
estis kaŭribema, nur petis la plej elementajn kaj altvalorajn nutraĵojn, la panon.  
La imperiestrino ne konis la valoron de la pano, de tiu pano prezentita en norma-  
la aspekto, sen iu ajn ornamaĵo kaj eleganta nomo. Tiu nesacio pri la plej adorata  
kaj ĝuzirata el ĉiuj manĝaĵoj, la pano, kostis al ŝi, sian propran vivon.

La pano ne nur estas materia nutraĵo, kiu kontentigas la bezonojn de la  
korpo. La pano estas spirita valoro, kiu subtenas nian fidon kaj esperon.

Efektive, nur la Kristanoj la pano havas spiritan signifon, nome: La mult-

la signifon de la Kristana religio tiutempe. La pano en la Eŭkariisti-  
kifon, kiu reliefigas la kredon al la fido kaj donas forton spiritan al  
nio. Donu al ni la ĉiutagan panon..... estas preĝo de ĉiu kristano  
la pano ne nur estas materia nutraĵo, sed spirita rekomfortaĵo, kiu pl-  
esperon kaj fidon de la homo por la nuna kaj postmorta vivo. En ĉi tiu  
irita neniu alia nutraĵo povas atingi la valoron de la pano.

La pano, ne nur estas tiu manĝaĵo, kiu oni prezentas aparte sur  
tablo. La pano estas unu el la plej gravaj kaj elementaj substancoj por  
aliajn manĝaĵojn. Ni ne devas forgesi, ke tritikfaruno estas sinonimo  
ĉiu tritika farunaĵo rekte rilatas la panon.

Mi ne estas spertulo en la preparado de manĝaĵoj, tamen mi bone  
scias aplikaĵoj de la pano en la kuirarto. Ekde la simpla pansupo kun  
lo, ĝis tiuj farunaĵoj de la grandaj kaj luksaj hoteloj, la vico de la  
kiuj la pano aŭ la tritikfaruno estas ĉefa solanto por la bongustigo  
ĝiaj farigaĵoj longa kaj varia. Ĉerte la valoro de la pano estas nekalk-

La proverbaro estas fonto de filosofio, kiu bone eksponas la  
ron kaj kutimojn ĉu regionajn aŭ enlandajn. Proverboj aŭ diraĵoj pri la  
tas multaj kaj ĉiuj konscie montrantaj la rolon de la pano kaj  
ron en la ĉiutaga vivo de la homoj. Jen iuj el ili, kiel specimeno: K  
vino oni trainas la vojon. Jen la pano kiel baza nutraĵo por tio tiel  
estas la piedirado, precipe en pasintaj tempoj, kiam tiom oni devis ma-  
nian alian manĝaĵon oni petas por tia fizika ekzercado, nur panon ĉar ĝi  
pablo estas unika por la homa korpo.





na skon

Novan Jaron (e)



MADRIDA ESPERANTO LICEO  
Atocha 98 4º  
28012 Madrid





# KRIMO POR KOMENCANTOJ

RAKONTO:

## Perfekta murdo

Georgo Kamaĉo kaj  
Ksavero Moleono, Hispanio ●

– Saluton! Kun sinjorino Takt, mi petas.

\*\*\*\*\*

– Saluton! Kun sinjorino Takt. Kiu?

– Mi estas Kon. Kiam vi finos?

– Tuj, kara.

– Ankaŭ mi ĉi tie. Iru al la Obeliska Placo

kaj atendu min. Mi venos tien post tridek minutoj, je la naŭa.

– Ĉu okazas io grava, edzĉjo?

– Ne, tute ne. Post tridek minutoj, ne forgesu.

– Ĝis!

– Ĝis...!

\*\*\*\*\*

– Ĉu vi venas aŭ restas fine?

– Kompreneble, ke mi tuj iros. Sed, kie estas mia edzino?

– Mi ne scias, sinjoro Takt.

– Ŝi ne troviĝas en la Klubejo, mi ĵus telefonis.

– Sed rapidu, la rifuĝejo aŭtomate memfermiĝos post dek minutoj, je kvarono antaŭ la naŭa.

\*\*\*\*\*

– Kio do pri via edzino, Kon?

– Mi, mi ne scias. Estas terure: la pordeĵam fermiĝas.

– Sed eble oni avertis ŝin kaj ŝi eniris la kontraŭ-atombomban rifuĝejon de via hejmo.

– Mi tutkore esperas...

\*\*\*\*\*

– Estas la oka kaj kvindek kvin. Kelkaj raketoj jam flugas super nia teritorio. La unua eksplodos proksime al la Obeliska Placo.

– Finfine jen la milito, sinjoro prezidento Kon Takt.

– Ni geedziĝis antaŭ tridek jaroj...

\*\*\*\*\*

– Jam estas la horo, kaj li ankoraŭ ne alvenis.

– ... tri, du, unu, NULO.

**Perfekta:** tute ĝusta; kun tio necesa; sen menko  
**Murdo:** mortigi homon sen akceptebla kialo  
**Placo:** granda libera loko en urbo, kie ne troviĝas konstruaĵoj

**Edzĉjo:** kara edzo

**Rifuĝi:** serĉi kaŝ-lokon en malfacilega situacio

**Ĵuo:** antaŭ mallonga tempo

**Aŭtomato:** maŝino, kiu funkcias sen homa direktado

**Terura:** tre timiga

**Averti:** antaŭsciigi iun pri io malbona, kiu okazos poste

**Atombombo:** atombombo falis sur la urboj Hiroŝima kaj Nagasaki dum la 2a mondmilito

**Raketo:** milita maŝino, kiu flugas tra la aero

**Teritorio:** regiono, kie iu ŝtato aŭ urbo direktas la aferojn

**Eksplodi:** disrompiĝi per grandega forto, ekz. kiel atombombo

**Prezidento:** prezidento de ŝtato, elektita ŝtatestro en respubliko

**Nulo:** numero kun neniu valoro (0)



Ni montras la facilecon de artikoloj jene:

Plej facila (520 vortoj)

tom malpli facila (1000 vortoj) ●

# UEO

TEKSTO KAJ  
DESEĜNOJ:  
G. KAMAĈO





## ~ KUNLABORAJO ~

Kiam mi aŭdas pri homoj kiuj vojaĝas eksterlanden, almenaŭ laŭ la dirita intenco plezure, kaj ĉiam plendas ĉar la manĝo estas "stranga", ne kiel hejme, sia hejmo, kompreneble!

Kaj la manĝhoraro?. Freneza!

La loĝantaro ĉiam krias, ĉu ne?

Mankas efiko, terure!

"Tli", la lokaj loĝantoj, la frenezuloj, eĉ ne povas paroli nian lingvon. Ĉu vi iam remarkis tion?

Kaj tiel plu, kaj tiel plu..

Kiam mi aŭdas pri tiaj homoj mi ne vere koleras kontraŭ ilin, mi pli ofte vere kompatas ilin por ilia maltrafita ŝanco koni aliajn popolojn, aliajn vivmanierojn kaj konsekvence, ankaŭ pli bone sin mem,

Jes, kompreneble, ĉiu havas plue siajn propajn kutimojn, ŝatojn kaj malsatojn, sed ne kiam oni vizitas novan lokon, kaj eĉ ne necesas esti eksterlande, oni klopodas eniri la lokan, kutiman etoson, ne nur la lokaj loĝantoj akceptas nin multe pli volonte, sed oni rigardas el de pli valida vidpunkto kaj tiel ekkomprenas la tiean vivon iom pli bone kaj preskaŭ ĉiam oni venas al la konkludo ke ĉiuj manieroj estas taŭgaj por la popoloj kiuj uzas ilin kaj ke kelkfoje estus konsilindaj ankaŭ por aliaj.

Iun tagon mi interparolis kun eksterlandana amiko mia sed ni ne diskutis, ni tute konsentis pri la tuta afero.

Subite, iu sola sinjoro kiu de longe sidis ĉe la apuda tablo en la restaŭracio alparolis nin kaj diris: Kompreneble, "Inter lupoj, krii lupe!"


Tio okazis antaŭ multaj jaroj sed ni ambaŭ neniam poste fargesis tiun esprimon.

Ana

Notoj: HAVI PLUE = Seguir teniendo

EN LA KONKLUDON, AL LA KONKLUDO, VENI AL LA KONKLUDO

INTER LUPOJ KRIU LUPE = Donde fueres haz lo que vieres






EL LA REVUOJ  
DE NIA BIBLIOTEKO

- El periodico 10-9-84. Unu paĝo pri la lingvo internacia kun foto kaj desegno
- Heroldo de Esperanto N<sup>o</sup> 10-11 (1733-1734). Multaj informoj pri la Universala Kongreso de Kanado. TEJO Meksikio projektas verki informfilmon pri Esperanto
- Garbo 2.10.84 .Du paĝoj pri Esperanto
- La Cenaĉero N<sup>o</sup> 3. Ekde tiu numero oni publikigas biografiojn de la plej famaj esperantistoj de nia Movado en la fako de literaturo.
- Bulgara Esperantisto Junio 84. Vojaĝimpresoj al Hispanio.
- Esperanto Oktobro 1984. UEA sendis aliĝilojn por la Universalaj Kongresoj de Aŭsburgo kaj Pekino kun speciala tarifo ĝis decembro. Montevideo 8an decembro de 1954, la Ĝenerala Konferenco de Unesko aprobis la konsultajn rilatojn kun UEA, la konatan rezolucion favore al Esperanto (la 10an decembro)
- Educación permanente N<sup>o</sup> 17. (Fundación Francisco Torio) "El Esperanto vínculo de fraternidad universal" (El Brita Enciclopedia)
- Kontakto N<sup>o</sup> 86. La temo estas KRIMO. Jorge Canacho kaj Javi Monleón kunlaboras per unu paĝo.
- Sano (ĉeĥa Esperanto Asocio) cirkulero de medicinistoj, farmaciistoj, geflegistoj, rugkrucanoj kaj de tiuj kiuj interesiĝas pri medicino.
- Vesfaliaj flugfolioj N<sup>o</sup> 59 1984/4. Lope de Vega: Romance de Don Fernando (La Dorotea I, 4)
- Heroldo de Esperanto 1a oktobro 1984. Usona televida filmo pri E-o (origino, uzo, k.t.p.). Aperis nova revuo pri komerco /Internacia Revuo pri Ekonomio kaj Komerco/
- En la ĵurnalo de Huesca (Aragono) aperis anoncon de la kultura centro "Edelweis" petante profesoron de Esperanto. La grupo Frateco (Zaragozo) kontaktis kun ĝi.
- El Popola Ĉinio n<sup>o</sup> 10-1984. Tre interesa artikolo pri ĉina arkeologio "Retrovo de Reĝa Maŭzoleo longe perdita". Eble iu povas traduki hispanlingve kaj sendi al hispana revuo (MUY INTERESANTE, REVISTA DE ARQUEOLOGIA Ktp) EPC permesas uzi siajn fotojn kaj artikolojn.
- MONATO N<sup>o</sup> 10-1984. Monografio pri "siĝoj" (sekto el Hindujo).

2 4 . 1 2 2

(NUMERO REKOMENDITA PRO A.A.D.P.) (★)



La **LICEO** havas du grandajn enspezaĵojn: la kotizojn de la membroj kaj la Kristnaskan Loterion.


La pasintan jaron ni vendis 131 biletdekonojn, kiuj enspezis 80.000 ptjn kaj ĉi tiu jaro ni esperas pliigi la ciferon.

Ni ludas la numeron **24.122** ĉar ni konsultis la ste-lojn (verdajn kompreneble) kaj ili rekomendis al ni tiun ekvilibrantan numeron: la paraj numeroj ĉirkaŭas al nepara unu.

La finaĵo 22 neniam estis finaĵo en la Kristnaska Loterio. La dika premio finis due dek unu fojojn, la lasta antaŭ kvindek-ses jaroj, kaj la miliaro dudek kvarmil aperis kvin fojojn en la dika premio de la Kristnaska Loterio. Pro tio ni esperas, ke la sorto venos en la Liceon kaj ni povas disdoni dikan premion inter esperantistoj kaj esperantamantoj.

NI ATENDAS VIN EN LA LICEO, pretere merkrede, POR ACETI  
KAJ VENDI LOTERIOS

LA VENONTAN TRINKEJAN DISKUTON  
ESTOS LA 6-a DECEMBRO.  
NI RENKONTIGOS JE LA SEPA EN  
LA LICEO.  
Venu nur se vi parolas E-on



Jen grafikaĵo pri la plej  
 importantaj mineralaj materioj  
 por la bona nutrado de la korpo:

MINERALA MATERIO	FUNKCIO	NUTRAĴO
Calcio	Disvolvas ostojn kaj dentojn. Estas necesa por koaguli la sangon. Ekvilibras muskolojn kaj nervojn.	Asparagoj, faboj, florbrasikoj, blitoj, brasikoj, kartofoj, celerio, laktaj produktoj, migdaloj, cepoj.
Carbono	Renutras la korpon.	Viando, sukero, ovoĵ.
Calco	Kresko kaj normala apetito.	Hepato, fiŝo, Krustuloj, cerealoj, legomoj.
Cloro	Estas necesa por la digesto. Favoras la stomakan sekrecion kaj aktivigas enzimojn.	Fromaĝo, brasikoj, celerio, daktiloj, ovoĵ, endivioj, fiŝo, terpomoj, spinakoj, cepoj, ostroj.
Cupro	Kune kun fero faras la hemoglobinon.	Brano, hepato, fungoj, pizoj, legomoj, fiŝo, krustuloj, kokido, integralaj cerealoj.
Fluoro	Konservas kaj protektas ostan strukturon en la korpo.	Blitoj, laktaj produktoj, brasikoj, ajloj, spinakoj, krustuloj, fiŝo, integrala tritiko kaj sekalo, kresoj.
Angano	Estas necesa por la kresko kaj la spirado de la histo.	Bananoj, faboj, blitoj, brano, kardoj, pizoj, migdalo
Fero	Produktas ruĝajn globulojn.	Migdaloj, asparagoj, faboj, florbrasikoj, celerio, kardoj, ovoflavo, koro, reno, hepato, krustuloj, riboj, daktiloj, prunoj, kresoj, orangoj.
Ijlo	Efikas kontraŭ infektaj malsanoj. Estas necesa por la kresko de la hararo, dentaro, kaj ungoj.	Fruktoj, tritiko, asparagoj, spinacoj, pizoj, endivioj, kartofoj, faboj, ĉerizoj, figoj, tomatoj, cepoj, blitoj, brasikoj.

MINERALA MATERIO	FUNKCIO	NUTRAJO
Jodo	Estas necesa por la tiroideo kaj por la metabolo.	Fiŝo, krustuloj, brano, karadoj, butero, karotoj, spinaĵoj, ĉerizoj, maizo, cepoj, ajloj, figoj, fungoj, kresoj
Magnezio	Estas necesa por la muskola aktivo. Tre necesa por la osta - strukturo kaj por la nerva stabilo.	Migdaloj, hordeo, kardoj, faboj, maizo, pizoj, prunoj, figoj, terpomoj, daktiloj, bananoj, karotoj, fiŝo.
Nikelo	Ekvilibras la sukerojn en la korpo.	Laktukoj, verdaj faboj, cepoj, ajloj, celerio, tomatoj.
Fosforo	Kune kun kalcio fortigas la ostan strukturon de la korpo. Estas necesa por metaboli la hidraton el karbono kaj la graso.	Migdaloj, hordeo, brano, fromaĝo, ovoj, lentoj, hepato, lakto, asparagoj, brasikoj, maizo, celerio, florbrasikoj, fiŝo, figoj, tritiko, sekalo, laktukoj, spinacoj, tomatoj.
Zinko	Estas necesa por la kresko kaj spirado de la histo.	Legomoj, kresoj, hepato, ostroj, blitoj, brasikoj, fiŝo, spinacoj.
Kalcio	Bona por la kresko kaj la muskola funkcio.	Brano, olivoj, terpomoj, spinacoj, bananoj, blitoj, brasikoj, karotoj, celerio, ĉerizoj, laktukoj, lakto.
Proteino	Estas necesa por la sintezo de la proteino de la korpo.	Fromaĝo, ovoj, fiŝo, sen grasviando, pizoj, kardoj, florbrasikoj, ostroj, aveno, kresoj, cepoj, napoj.
Ŝiŝo	Protektas la histojn kiam la korpo perdas akvon.	Fromaĝo, ostroj, bovo, blito, karotoj, kardoj, kresoj, spinacoj, olivoj, lakto, napoj, ovoj.
Vitamina C	Necesa por la salivo kaj la cirkulado de la sango. Mildigas la nervojn kaj kontrolas la varmon de la korpo.	Citronoj, limedoj, oranĝoj, viberoj, persikoj, ananasoj, prunoj, ĉerizoj, tomatoj, pampelmusoj, akvomelonoj.
Vitamina B	Efikas kiel riparilo kaj rekonstruilo de la histoj.	Laktaĵoj, lentoj, palinuro, karotoj, salmo, aveno.

Alicia García (Revuo COSEBA)  
tradukita Klara kaj ...


# La vivo en la Liceo

- .- En la oktobra estrarkunveno oni aprovis ke la gelernantoj pagos 200 pesetojn kiel aliĝilon al la kursoj organizotaj en la LICEO, tial ili helpos nin ekonomie.
- .- La pasintan oktobron kelkaj liceanoj gluis afiŝojn anoncante la novajn kursojn, ĝi estis unu el la plej sukcesa gluado kaj multaj akceptis sian bapton en tiu ismo.
- .- Ni kolektis uzitajn poŝtmarkojn por poste vendi. Se vi havas pakajoj, BV. sendi al la LICEO. Eble ni povas pagi per ili la telefonon aŭ la lumon.
- .- Ekde oktobro ni rekomencis la TRINKEJAJN DISKUTOJN. Ĝi okazos ĉiu monate: la unuan jaudon (se estas festo la mardon). Ni renkontiĝos en la LICEO je la sepa AKURATE. Dum la diskuto oni parolos pri diversaj temoj NUR EN ESPERANTO. Bonvolu sindeteni ne esperantaj parolantoj.
- .- Japansamideano KUDO SOKO lernas hispana lingvo en Madrido kaj venas kutime al la LICEO.
- .- Georgette akompanis kiel ĉiĉeronino italan samideaninon LEA dum unu vespero
- .- Ada prelegis pri sia antaŭkongresa vojaĝo tra Usono kaj pri la Vankuvera Internacia Kongreso.
- .- Samideano PATA el Irano partoprenis la 24an oktobron en nia konversacia rondo
- .- Nia karega MAMEN estas kunlaborantino de la nova gazeto "La Revista". En ŝia "Kurrikulumo" mankas esperantistino.

## CARMEN DAVILA

Diplomada en Genealogia, Heráldica y Nobiliaria por el Instituto Luis de Salazar y Castro, del CSIC, y miembro fundador de la Asociación Iberoamericana de Heráldica y Genealogía. Curso en la Universidad Autónoma de Madrid la licenciatura de Genealogía e Historia (Arqueología). Miembro del Solar de Tejada y de la Comunidad Mozárabe de Toledo.

.- 27a-28a oktobro ni renkontiĝis en Albarracin (Teruel) kun samideanoj el Valencio kaj Zaragozo. Partoprenis 50 personoj. La temo estis la novaj grupoj de Teruel kaj Albarracin. Ili ne havas profesoron, do li devas lerni autodidakte. La grupoj partoprenantoj oferis siajn materialojn (kasedoj, lernol broj k.t.p.) kaj, eble, Dennis voĝajos ĝis Teruel iuj tagoj por kontroli la funkciadon de la novaj grupoj. La etoso es-



tis amika kaj amuza sed oni ne parolis multe Esperanton ĉar la novaj eklernantoj ne konas la lingvon. Ni ankaŭ parolis pri la eblecon organizi esperantan laborbrigadon kun oficiala apogo, la valencianoj jam kontaktis kun Ministerio pri Kulturo.

.- La prelego de oktobro temis pri mikrokomputiloj. Parolis Miguel ANgel Sancho kiu faris praktikajn ekzemplojn per sia "SPECTRUM"

.- Nia kara samideano Marton, el Hungario, vizitis Madrido kaj partoprenis en nia komuna bankedo. Emi, Clara, Mary Luz kaj Ada preparis specialajn manĝaĵojn.

.- 26an oktobro Augusto prelegis en la Popola Universitato de Alcorcón pri "Esperanto, la lingva internacia"

.- La 1an novembro okazis en la Liceo la Unua Seminario pri Fonetiko de Esperanto. partoprenis Sro. Alonso Nuñez kaj kelkaj liceanoj.

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO. Atocha 98 4º

Baza Kurso P-rino: Ana Montesinos. Gelernantoj: 14  
Lunde kaj jaŭde de la 6a ĝis la 7½

Perfektiga P-ro: Miguel Fernández. Gelernantoj: 12  
Merkrede ĵaj jaŭde de la 7a ĝis la 8½

CENTRO CULTURAL DE MORATALAZ. Corregidor Alonso de Tobar 7

Baza kaj perfektiga kurso. P-rino: Georgette Lelievre. Gelernantoj: 6  
Por horoj kontakti tlf. 7-73-50-95

PARROQUIA NTRA SRA MORATALAZ. Entrearroyos 19.

Baza kaj perfektiga kurso. P-rino: Georgette Lelievre. Gelernantoj: 5  
Por horoj kontakti tlf. 7-73-50-95

UNIVERSIDAD POPULAR DE ALCORCON. Alcorcón (Madrid) Virgen de Iciar 17

Baza kursoj P-ro: Augusto Casquero. Gelernantoj: 18  
Marde kaj jaŭde de la 7a ĝis la 9a Tlf: ~~2-18-78-50~~  
4-74-87-37

CLUB DE AMIGOS DE LA UNESCO DE MADRID. Plaza Tirso de Molina 8-1º

Baza kaj perfektiga. P-ro: Juan Navareño. Gelernantoj: 8  
Marde kaj jaŭde de la 8a ĝis la 9a

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO. Rodriguez San Pedro 13

Baza kaj perfektiga. P-rino: Paquita. Gelernantoj: 10  
Lunde de la 7a ĝis la 8.30a

ASOCIACION ESPIRITISTA DE MADRID Puerta del Sol 3

Perfektiga kurso. P-ro: Pepe F. Arroyo  
Por horoj kontakti tlf. 7-33-65-83

.- Ana Montesinos partoprenis, en Avignon, en la Internacia Esperantologia Konferenco. La organizinto, Literatura Foiro, parolis kun Ana pri la organizado en Madrido de Esperantologia Semajfino. La estraro de la Liceo aprovis la ideon.